

FRANCA KATOLIKA ESPERANTISTO



N° 213 JULIO 2002

La numero : 2 euroj Abono: 7 € Kotizo: 3 € Sume: 10 €

TRIMONATA BULTENO de FRANCA KATOLIKA ESPERANTO ASOCIO
(Filio de I.K.U.E. = Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista)
BULLETIN TRIMESTRIEL DE L'ASSOCIATION CATHOLIQUE FRANCAISE
POUR L'ESPERANTO

*** *Sankta PIO X-a, preĝu por ni* ***

Imp. MOSER - 68127 NIEDERHERGHEIM



Sommaire/Enhavo

	Pages/Paĝoj
Le mot du président - <i>La bileto de la prezidanto</i>	3
Prières - <i>Preĝoj</i>	5
<i>Evento de St-Amarin (68)</i>	6
<i>En nia Asocio - Raportoj</i>	8
Kalendaro	14
Abonnements - <i>Kotiztabelo</i>	15

ESPERANTO : INTERNACIA LINGVO

Expéditeur/: Ass. Cath. Française pour l'espéranto
Sendinto 9, rue Paul Doumer
F- 68920 WINTZENHEIM-COLMAR

Motif de non distribution

- Adresse insuffisante
 N'habite pas à l'adresse
 Refusé
 Autres

Périodique Semi-routé

PORT PAYE

COLMAR (68)

Surkovrile

Ordinado de kvar junaj viroj el kiuj unu estas esperantisto : Gabriel Anda.

Okazis en Alzaco la 9an de junio 2002.
Gratulojn al Ili .

L'esperanto. Face aux problèmes linguistiques, une langue neutre vraiment internationale pour les contacts directs d'homme à homme.

Ĉiujn artikolojn oni rajtas reprodukti kondiĉe ke estu citata la fonto. Specimenon kun represo aŭ tradukado oni sendu al la redaktoro.

La materialon por la bulteno oni sendu al la redakcio nepre antaŭ la 25.a de septembro 2002. Venonta bulteno aperos fine de marto.

Finpresado la 29/07/2002

FRANCA KATOLIKA ESPERANTISTO

Nro 213 Julio 2002

Trimonata eldonaĵo de
Franca Katolika Esperanto
Asocio (Association Catholique
Française d'Esperanto A.C.F.E.)

CCP : 2 324 93 N Rouen

Prezidanto:

S-ro A. BESSIERE
28, Rue C. St-Saëns
76000 ROUEN

Sekretario:

F-ino A.M CHANEY
56, Rue Corvisart
75013 PARIS

Kasisto :

S-ro G. VILLENEUVE
14, Rue Clair de Lune
91530 SAINT-CHERON

Religia Konsilanto :

P-ro HEROUX
Maison St-Joseph
26400 ALLEX

Peranto IKUE:

S-ro PONS Roger
Rue du 8 Mai 1945
87510 NIEUL

Redakcio :

Fam. BASSO-RESCIO
9, Rue Paul Doumer
68920 WINTZENHEIM

Fakse 0389794333

Rete 100623.3022@Compuserve.com

Le mot du Président

Notre association a toujours entretenu de bonnes relations avec les autres organisations espérantistes, notamment avec nos frères protestants lors des congrès oecuméniques de Viviers et de Nantes.

La plupart d'entre nous adhèrent à de nombreux mouvements espérantistes et tout spécialement à Espéranto-France, qui est la principale association pour l'ensemble des espérantistes de notre pays.

Ces relations harmonieuses vont connaître une ampleur plus importante et surtout plus officielle. Notre association vient en effet de signer avec Espéranto-France un accord de collaboration réciproque qui renforcera nos liens et surtout leur donnera un aspect contractuel et régulier. Vous lirez plus loin le texte de cet accord.

Au moment où l'on évoque la mondialisation, il était en effet plus que jamais nécessaire que nous joignons nos forces à celles d'Espéranto-France dans le respect de nos spécificités propres.

Un chrétien espérantiste ne peut vivre sa vie dans l'isolement. Si l'on est chrétien, si on pratique l'espéranto, ce n'est pas pour rester dans son quant à soi, c'est pour communiquer, rayonner notre Foi et faire progresser de notre mieux l'étude et l'usage de la langue universelle. C'est pourquoi les diverses associations espérantistes doivent s'entraider et travailler de concert à la réalisation de leurs buts communs.

Le bulletin ne manquera pas, au cours des mois à venir, de vous tenir au courant des résultats importants que présage l'accord entre nos deux associations.

La bileto de la prezidanto

Nia asocio ĉiam havis bonajn rilatojn kun la aliaj esperantistaj instancoj, precipe kun niaj protestantaj fratoj okaze de la ekumenaj kongresoj en Viviers kaj Nantes.

La plimulto el ni aliĝas multnombrajn esperantistajn movadojn, kaj tutspeciale al Esperanto-France, kiu estas la ĉefa asocio por la esperantistaro en nia lando.

Tiuj harmoniaj rilatoj tuj ricevos pli gravan kaj precipe pli oficialan amplekson. Nia asocio ja ĵus subskribis kun Esperanto-France kontrakton por reciproka kunlaboro, kiu plifortigos niajn ligilojn kaj precipe donos al ili kontraktan kaj regularan aspekton. Vi legos poste la tekston de tiu kontrakto.

Ĝuste kiam oni elvokas la mondaniĝon, estis pli kaj pli necese, ke ni kunligu niajn fortojn al tiuj de Esperanto-France, respektante niajn proprajn specifecojn.

Esperantista kristano ne rajtas privivi en izoleco. Se oni estas kristano, se oni praktikas la esperantan lingvon, tio ne estas por stari en sia deteniĝemo, tio estas por komuniki, radii nian Fidon kaj progresigi la studadon kaj uzadon de la universala lingvo. Tial la diversaj esperantistaj asocioj devas helpi sin reciproke kaj en akorde labori por realigi siajn komunajn celojn.

PACO

Maria, ni preĝu por la paco sur nia Tero,
 ĉar la Tera paco estas ĝismorte malsana,
 Helpu nin, Virgo Maria, helpu nin diri:
 " Paco estu sur nia malfeliĉa mondo ":
 havigu pacon al ni.
 Vi, kiu ricevis en vi mem la Vorton de Paco,
 havigu al ni pacon.
 Vi, kiu finfine donacis la Sanktan Infanon de Paco,
 havigu al ni la pacon.

Gertrude von Lefort -traduko AB

PREĜO de la ARBARO

Homoj,
 Mi estas
 la varmeco de via hejmo dum la malvarmaj vintraj pluvoj,
 la amika ombrejo dum la brulanta somera suno .
 Mi estas
 la ĉarpentaĵo de via domo , la tabulo de via tablo,
 Mi estas
 la lito en kiu vi dormas
 kaj la ligno kun kiu vi konstruas la marŝipojn.
 Mi estas
 la maniko de via plugpioĉo kaj la pordo de via ĉirkaŭbarilo
 Mi estas
 la ligno de via lulilo kaj de via ĉerko .
 Aŭskultu mian preĝon kaj ne detruu min .

(Trovita sur panelo en la enirejo de la arbara vojo de Wattwiller(68) ,
 farita de la lernejo. Pripensu kiam vi promenos en la arbaroj.)

Esperanto en Saint-Amarin

La 9an de junio okazis en la preĝejo de Saint-Amarin (en la valo de Thann) grava religia ceremonio. La preĝejo estis plena. La episkopo de Strasburgo Monsinjoro Doré celebris la ordinadon de 4 junaj viroj. Michel, Thomas, Gabriel, Christophe estis ordinataj diakonoj. Gabriel Anda estas esperantisto el Kamerunio kaj en la lastaj jaroj studento en Strasburgo. Per tiu ceremonio li fariĝis diakono por poste iĝi pastro, kio verŝajne okazos antaŭ unu jaro. Li estas el la diocezo Edéa el Kamerunio.

Gabriel estas bone konata de pluraj esperantistoj el la regiono kaj el Germanio. Iam li estis gasto de Odette Scheidel el Betschdorf, ankaŭ germanaj samideanoj gastigis lin. Tial al tiu ceremonio venis pluraj esperantistoj el Betschdorf, el Villigen-Schwenningen en Germanio, pastro Andreo Héroux el Allex (departemento 26), iama misiisto en Kamerunio, por renkonti kaj subteni Gabriel Anda en tiu tago de lia diakoniĝo.

Post la ceremonio en la preĝejo, la ĉeestantoj (pli ol 500 personoj) estis invitataj akcepti honorvinon kaj diversajn kukojn en fest-salono de la vilaĝo. Tiam estis okazo por la samideanoj renkontiĝi kaj kune babili. Fine venis ankaŭ Gabriel, kiun ni varme gratulis pro tiu grava decido en lia vivo. Tre verŝajne ni ĉiuj iom fieris, ke inter la 4 novaj diakonoj estas esperantisto, simpatia juna viro el Afriko, nia amiko.

André Grossmann



Gabriel Anda, 36-jara, originas el Kamerunio, kie li studis. Poste li venis al Francio por studi teologion en Champagne sur Rhône. Antaŭ 2 jaroj li eniris la Seminarion de Strasburgo por plua studado. Ĉi-jare li eniris la paroĥejon de Schiltigheim apud Strasburgo. Monsinjoro Tonyé Bakot, episkopo de Edéa en Kamerunio prezentis lin por la ordinado.

En 1995 s-ro Hans Bakker (afrika agado ĉe UEA) direktis la lernanton Gabriel Anda al Odette Scheidel el Betschdorf, por perfektiga perkoresponda kurso. En 2001 ŝi gastigis lin en sia hejmo dum monato. Li tiam partoprenis la korusojn de s-ino Schmitter. Ofte li vizitis la vilaĝon, kie li havis multajn geamikojn kaj loĝis ĉe "ia avineto". Jen foto de la junulara grupo okaze de la regiona kongreso en Strasburgo en 2001. Odette estas konata, kiel avinjo Esperanto. Jen ŝi estas ĉi-tie en la centro inter gejunuloj kaj apud Gabriel Anda.



Ĝenerala Kunveno de nia asocio en Strasburgo la 18-an de Majo 2002

La ĝenerala kunveno de nia asocio okazis en Strasburgo, sabaton la 18-an de majo 2002. Prezidis S-ro Bessière.

La prezidanto prezentis la finanĉan raporton, kiu estis aprobita de 51 voĉdonantoj; 2 sindetenis . La agadraporto estis aprobita de 52 voĉdonantoj kaj 1 sindeteno.

Poste okazis la voĉdonado por la elekto de 1/3 de la komitato. 53 anoj voĉdonis.

S-ino Chaney ricevis 53 voĉojn, F-ino Michel 51, S-ino Lafargue 51 kaj S-ro Lafargue 51. Do ĉiuj estis reelektitaj por 3 jaroj.

S-ino Abada-Simon ricevis 50 voĉojn kaj estis elektita por du jaroj.

La prezidanto prezentis la akordon de reciproka kunlaboro kun Esperanto-France; ĝi estis aprobita de 42 anoj, 7 voĉdonis kontraŭ kaj 2 sindetenis. Tiu akordo estis ankaŭ aprobita de la komitato de Esperanto-France kaj do nun ekfunkcias.

La asocio kongresos en 2003 tuj antaŭ la nacia kongreso en urbo proksima al tiu de la nacia kongreso.

7

S-ro Basso raportis pri la bulteno kaj ties enhavo . Tiu-ĉi entenos novaĵojn pri katolikaĵoj kaj esperantaj aferoj.

Post la ĝenerala kunveno, eksterordinara ĝenerala kunveno aprobis la modifon de la statuto per 50 voĉoj; 2 voĉdonis kontraŭ; 1 sindetenis.

KOMITATKUNVENO de la 18-an de majo 2002 en Strasburgo

Ĉeestis: S-ro Bessière, Pastro Heroux, S-ino Abada-Simon, F-ino Chaney kaj S-ro Basso.

Petis senkulpigon: S-ro Villeneuve

La prezidanto bonvenigis S-inon Abada-Simon, kiu anstataŭigas S-ron Colleu . Li emfazis la bonan laboron faritan de li dum pluraj jaroj. Aktiva esperantisto kaj sincera katoliko, S-ro Colleu estis utila al la asocio kaj multe helpis ĝin en la eldono de liturgiaj libretoj, precipe meslibreto kaj rozari-libreto.

La komitato decidis, ke la prezidanto partoprenos la komitatkunvenojn de Esperanto-France . kiam li ne estos libera, la sekretariino anstatauigos lin . Reciproke Esperanto-France estos reprezentata en niaj komitatkunvenoj de S-ro J.L Texier.

La venonta komitatkunveno okazos en Parizo la 16-an de oktobro 2002.

NACIA KONGRESO en STRASBURGO

La jara kongreso de Esperanto-France okazis je Pentekosto en Strasburgo, sed nur 91 homoj partoprenis ĝin . Tamen la etoso estis amika kaj la farita laboro valora.

Tiu kongreso estis tiu de la korelativoj: ĉiutage oni demandis sin, kie, kiam, en kia salono, je kioma horo, kun kiu okazas ion ajn . Aviz-tabulo aperis dimanĉe matene, sed malaperis posttagmeze kaj ne plu revenis !

Spite de tio, ĉiuj finfine trovis la lokon, kien li devis iri !

Ni ne rakontos detale pri ĉiu aranĝo kaj decido; ni substrekos nur la ĉefajn aferojn, kiuj estis gravaj aŭ rilatis nian katolikan asocion .

La plej interesa prelego estis tiu de S-ro Kersaudy. En salono de la fama librejo Kleber , kie svarmis popolamaso da interesuloj, li bonege klarigis franclingve la devenon, strukturon kaj evoluon de la eŭropaj lingvoj kaj emfazis la utilecon de esperanto.

La komitato de Esperanto-France akceptis la kontrakton de reciproka kunlaboro de nia asocio kun ĝi, kaj la ĝenerala kunveno findecidis pri ĝia akcepto . Nia asocio estas nun ano de Esperanto-France kaj plenrajte partoprenos en la komitato de la nacia asocio.

Dimanĉe vespere diservo okazis en la preĝejo St Pierre le Jeune . Celebris Pastro Héroux , helpita de seminaristo Anda Gabriel , kiu gvidis la kantojn.

Dank'al la kompetenteco de S-ino Gallego, kiu gvidis nin, la vizito de Strasburgo kaj la tuttaga ekskurso al Kastelo Haut-Koenigsbourg kaj Colmar estis vera plezuro. (A.B)

EN NIA ASOCIO

Nova membro:
S-ro MOURE Christian (Hérault)

Bonvenon al la novulo.

La Biblio estas la krio de
Dio al la homoj.



ĈU OKAZOS BEATIGO DE PRELATO J. M. SCHLEYER?

En junio 2001 P. Bernhard Eichkorn, sacerdoto de diocezo Freiburg (Germanio) proponis al Lia Ekscelenco D-ro Oskar Saier, Arkiepiskopo de Freiburg, la beatigon de du diocezaj pastroj: D-ro Max Josef Metzger (1887-1944) kaj prelato Johann Martin Schleyer (1831-1912).

D-ro Metzger estis ekzekutita en 1944 fare de la nazioj, ĉar internacie li faris proponojn por nova komenco post la germana malvenko. Post la unua mondmilito li enpaŝis en la porpacan movadon kaj aktivis kiel socia reformisto. Dum la tridekaj jaroj li pioniris en la ekumena movado. En siaj porpacaj laboroj li aktive uzis la internacian lingvon Esperanton kaj metis ĝin en la servon de la Eklezio.

Prelato Johann Martin Schleyer estis la aŭtoro de la planlingvo Volapük (1879/80). Ankaŭ li konsideris sian lingvon kiel kontribuon al la porpacaj klopodoj. Schleyer estis konata ankaŭ kiel katolika lirikisto kaj filantropo. Pro siaj meritoj li ricevis de Papo Leono XIII-a la titolon monsinjoro.

Formiĝis Internacia Komitato por la Beatigo de prelato Johann Martin Schleyer, al kiu ĝis nun apartenas: D-ro Andre Albault (Francio), Sac. Bernhard Eichkorn (Germanio), S-ro Reinhard Haupenthal, (adreso de la sekretarioj: BP 19, F-84340 Malaucene. Ret-adreso: SchleyerKomitee@aol.com), S-ro Andy Kuenzli (Svislando) kaj S-ro Goncalo Neves (Portugaliao).

La komitato celas kolekti subskribojn, kiuj apogos la proponon faritan al la arkiepiskopo. Tiucele kontaktiĝos ĉiuj lokoj, kie Schleyer laboris kiel pastro. Lian nomon gardas strato kaj gimnazio en Lauda-Koenigshofen (la naskiĝ-loko), stratoj en Konstanz kaj Litzelstetten, memor-tabuloj ĉe la pastra domo de Litzelstetten kaj la loĝ-domo en Konstanz, same kiel Volapük-Vojo kaj Hotelo Volapük en Litzelstetten (www.volapuek.de).

La urbestro de Konstanz estis petita deklari la tombon de Schleyer historia monumento.

Kiu deziras subteni la proponon pri beatigo de Schleyer aŭ/kaj Metzger, bv. sendi deklaron kun persona subskribo al la sekretarioj de la Komitato.

KORAN GRATULON AL JUBILEULO

Lia Eminenco Kardinalo Miloslav Vlk

Lia Eminenco Mons. PhDr. Miloslav Kardinalo Vlk naskiĝis en Lišnice la 17-an de majo 1932. En la jaro 1952 li abiturientiĝis en gimnazio de České Budějovice. Komence li laboris kiel laboristo kaj post reveno el dujara soldata servo li en la jaroj 1955-1960 studis en filozofia fakultato de Universitato de Karolo en Prago fakojn de historio kaj



arĥivado kaj tie li en la jaro 1960 estis promociita. Li funkciis kiel faka arĥivisto en Třeboň kaj poste en České Budějovice. Teologion li studis en Cirilometodia Teologia Fakultato en Litoměřice (1964-68), kie li ankaŭ sacerdotiĝis. Li fariĝis sekretario de episkopo Josef Hlouch en České Budějovice. En la jaro 1971 sub premo de tiamaj ŝtataj oficejoj li forlasis tiun lokon kaj plenumis sacerdotan servon en paroĥo Lažiště kaj Záblatí, en Rožmitál pod Třemešnikem kaj samtempe li administris paroĥojn Bohutín kaj Drahenice. En oktobro 1978 la komunistaj ŝtataj organoj forprenis al li ŝtatan permeson por plenumo de publika animzorga aktivado. Li foriris en Pragon, kie li dum ok jaroj laboris kiel purigisto de vendejaj montrofenestroj. En la jaro 1986 pro sanproblemoj li forlasis ĉi-laboron kaj eklaboris kiel arĥivisto ĉe Ŝtata Ĉeĥoslovaka Banko.

Ekde 1-a de januaro 1989 estis redonita al li por unujara provtempo ŝtata permeso por praktikado de animzorga servo. Li iĝis paroĥestro en Žihobce kaj Bukovník, poste li administris paroĥojn en Čachrov, Běšiny, Javorné, Železná Ruda kaj Strážov.

En la datrevena tago de sanktaj Cirilo kaj Metodio la 14-an de februaro 1990 li estis nomumita sideja episkopo en České Budějovice. Julie 1991 lin Papo nomumis membro de Papa Konsilio por dialogo kun nekredantoj kaj septembre de la sama jaro li estis nomumita sekretario de Eksterordinara Sinodo de Eŭropaj Episkopoj, kiu okazis fine de la jaro 1991 en Romo. En aprilo 1993 li estis elektita Prezidanto de Konsilio de Eŭropaj Episkopaj Konferencoj (CCEE).

Papo Johano Paŭlo la II-a lin en novembro de 1994 kardinaligis.

Indas menci, ke en kvindekaj jaroj de la pasinta jarcento li estis membro de tiama junulara Esperanto-Klubo en České Budějovice. Li aktive partoprenadis agadojn de tiama tre vigla junulara E-aktivado. Dum la 48-a IKUE-Kongreso en la jaro 1995 en Olomouc Kardinalo Miloslav Vlk estis ne nur Alta Protektanto de la kongreso, sed ankaŭ iĝis Protektanto de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista. Li ankaŭ iĝis Alta Protektanto de la 55-a Kongreso de IKUE, okazonta julie de nuna jaro en Kroměříž.

SINCERE AL JUBILEULO GRATULAS la FRANCA IKUE-anoj

(el la revuo "Dio Benu" Nro 02/2002)

Saluto de Lia Eminenco Kardinalo Miloslav VLK al la 55-a Kongreso de IKUE en Kromeriz(CZ) Julio 2002

Karaj gesamideanoj,

Volonte mi okaze de tiu aranĝo rememoras la tempon antaŭ pli ol 50 jaroj, kiam ni post 2-a mondmilito estis liberigitaj de naziismo kaj antaŭ; ni malfermiĝis nova spaco de libereco kaj eblecoj de la kontaktoj kun la mondo. Tiam mi estis komencanta gimnazia studento en Eeské Budijovice, plena de elano kaj sopiro pri ekkonado de la mondo. Kaj fakte, post trafekventado de lingvaj kursoj de Esperanto - kaj eĉ de la Somera Lernejo por E-instruistoj mi pere de adresoj en diversaj Esperanto-gazetoj disvolvis riĉan korespondadon malgraŭ tio, ke pli poste tio al komunista reĝimo ne tro plaĉis; ĝi strebis nin apartigi de la mondo kaj malebligi la kontaktojn.....

Kuro de la historio, evoluo de la scienco kaj tekniko, ekonomio kaj politiko ĝenerale montras, ke la mondo ĉiam pli proksimiĝas en globalan (tutecan) fazon de sia evoluo, kiu strebas superi ĉiujn bremsantajn barierojn, eksterajn kaj internajn. Al la unuaj barieroj apartenas ne nur malriĉeco de la granda parto de la homaro, sed ankaŭ; la lingvaj barieroj, kiuj al multaj malhelpas partoprenon je bonecoj de la globala disvolviĝo. Al la duaj barieroj - eble ankoraŭ; pli gravaj - apartenas egoismo kaj malamo. Ideo de la internacia lingvo Esperanto efektivas strebadon pri forigo de la barieroj de ambaŭ specoj. Ĝi akcentigas spiritan pliproksimiĝon, amikecon kaj unuecon de unuopuloj kaj la nacioj, kiel gravan antaŭ-kondiĉon de la plua evoluado.

Mi deziras al la 55-a Kongreso de IKUE sur tiu vojo multajn sukcesojn kaj mi benas strebadon de la esperantistoj.

Kardinalo Miloslav VLK.

KALENDARO

2002

Augusto SEBRANICE (Ĉehio) apud Litomys
IKUE E-Tendaro.
En tendara frateca kaj amikeca etoso
Detalaj informoj kaj aliĝiloj estas
haveblaj ĉe : IKUE-Katolika Sekcio
Trsicka ul.6 CZ-751 27 PENCICE .

03/08 FORTALEZZA (Brazilo)
ĝis 87-a Universala Kongreso
10/08 de Esperanto.

23/08 VERONA (Italio)
ĝis 5-a Europa Kongreso de Esperanto
28/08

13/09 LUCCA (Italio) Marina di Pietrasanta
ĝis 16a Itala Katolika Kongreso
17/09 "Babele-Babilonio kaj Pentekosto"

2003

RIMINI (Italio)
30/08 16-a Ekumena Kongreso
ĝis 56-a IKUE Kongreso
06/09 53-a KELI Kongreso
6-a JET (Junulara Ekumena E°-
Tendaro)

Temo: vi estos miaj atestantoj, salo
kaj lumo por la mondo.

La Asocio Bezonas VIN

En 2003 kaj 2004 vakos postenoj en nia
Komitato . Ni do bezonas kandidatojn, por ĝi .

Eĉ se vi loĝas malproksime, eĉ se vi ne perfekte
regas la lingvon, eĉ se vi ne havas multe da tempo,
vi povas esti utila .

Do ne hezitu ! Sendu tuj vian kandidatecon al
la prezidanto aŭ al la sekretariino.

Ni vere bezonas vin.

Kotiztabelo 2002

I.K.U.E kun "Espero Katolika" 25 eŭroj
Peranto : S-ro PONS Roger
Rue du 8 Mai 1945
87510 NIEUL.

al kiu vi sendos ĉekon je la nomo de S-ro Pons

A.C.F.E kun "Franca Katolika Esperantisto"
unuopulo : 10 eŭroj
geedza paro : 13 eŭroj
gejunuloj ĝis 25jara, pastro, religiu(in)o : 5 eŭroj
bonfaranto : 30 eŭroj

Pagu al la kasisto : S-ro VILLENEUVE G.
14, Clair de Lune
91530 SAINT-CHERON

al kiu vi sendos ĉekon je la nomo de
Association Catholique Française pour l'esperanto

Dépot légal : 1er trimestre 2002 C.P.P.A.P : N° 62532
Imprimé par : A.C.F.E à 9, Rue Paul Doumer 68920 WINTZENHEIM
Enregistrée le : 14 Juin 1996 à la Préfecture de Police de Paris
sous le n° 026831 ; Journal Officiel du 03/07/1996
Directeur : Albert BESSIERE Directeur délégué: Michel BASSO